



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 216

Aprilo 2004

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas ankoraŭ \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

★ ★

ŜANĜIGEMA APRILO


Aprilo en Nova Skotio ĉiam estas monato de grandaj ŝanĝoj, plejparte veteraj. Printempo finfine komenciĝas post tro longa atendado, preskaŭ bedaŭrante la malaperon de frosto kaj neĝo, kaj floretoj malrapide komencas aperi. Por ne esti „kiel kutime unutema”, *Inter Ni* ĉi-monate festas la ŝanĝigemon de la sezono per kelkaj diverstemaj artikoletoj. Reni „guglas” la interreton (t.e. li uzas la retserĉan servilon ‚Google.com’) por trovi informon pri la propraj nomoj de lokaj esperantistaj amikoj. Mi agnoskas la fakton, ke „gugli” ne estas esperanta verbo (ĝi apenaŭ estas verbo en iu ajn lingvo), kvankam la substantivo „guglo” (la nombro 10¹⁰⁰) jam troviĝas en *NPIV*. En alia artikoleto, Reni klarigas malnovan kromnomon por nov-skotianoj. Laurinda memoras la sufiĉe severan kaj antaŭnelonge malvarman vintran sezonon en sia poemo. Ĉi-monate, ankoraŭ neĝetas kaj kanadanoj ankoraŭ ravas pri vintraj sportaj televid-spektakloj kiel glaciĥokeo, arta sketado kaj kurlingo [surglacia ŝtonludo]. La kanadaj ĉampionaj teamoj de kurlingo - kaj viraj kaj virinaj - devenas de la sama klubo en Halifakso, kaj ambaŭ konkurencas ĉimonte en la internaciaj ĉampionkonkursoj en Svedio. Aliteme, *Inter Ni* ĉi-monate festas datrevenon. Nia kompostisto Steĉjo ĉiam senspire kontrolas kontraŭ eraro en la ĉiumonata numerado. Ĉi tiu 216-a numero signifas, ke *Inter Ni* jam finas sian 18-an plenan jaron de ĉiumonata aperado. Por fini, mi devas refoje konfesi, ke ĉi tiu numero malfruiĝas. Ĉu la kialo estas la fakto, ke mi estas viro? Eli kvazaŭ rekte respondas.

Mi multe esperas, ke vi ĝuas nian gazeteton. Mi petas al vi, ke vi sciigu al ni viajn impresojn, ideojn kaj proprajn memorojn pri tio, kio gravas al vi.

— Via redaktoro

RENI „GUGLAS”

Ĉu ni vere konas niajn amikojn? Mi serĉis rete la nomojn de ĉiuj anoj de la loka Esperanto-klubo. Kaj mi malkovris multajn faktetojn; kelkajn, kiujn mi antaŭe ne sciis.



Connie Clarke estas mondfama aktorino. Sed tiu C.C. ne estas nia C.C. La nia estas mondfama kuiristino. Ŝi kuiras lerte por vizitantaj esperantistoj de Japanio, Koreio, Aŭstralio, Eŭropo kaj Anglio (kaj ankaŭ de Halifakso). Sed, pro ia kialo, oni ne mencias tion en la reto.

Kim Keeble estas kontrolistino de perpoŝta kurso kaj instruistino de Esperanto en la loka lernejo. Ŝia nomo estas menciita jaron post jaro en tiuj roloj.

Gene Keyes estis en la paca movado por multaj jaroj, kaj skribis multon koncerne la senperfortan defendadon. [Http://www.genekeyes.com/](http://www.genekeyes.com/) estas la retloko, kie li ofertas programon Hypercard 1.0, kiun li kaj Mariĵo Graĉa kreis. Tiu programo estas por organizi la memorindajn retlokojn. Li estis aktivulo por defendi la rajtojn de patroj, kaj li subtenas la uzon de biciklado en la halifaksa areo.

Bob Williamson: se oni enmetas nur la nomon „Bob Williamson” oni malkovras, ke la mondo havas multajn de tiel nomitaj viroj. Se oni enmetas „Bob Williamson Esperanto” oni malkovras, ke nia Bob estas redaktoro de *Inter Ni* kaj estrarano de la Kanada Esperanto-Asocio, kaj aktivus jam dum multaj jaroj.

Stejĉo Norvell estas aktivulo en la Esperanto-movado, ĉe kursoj, ĉe kunvenoj, kaj li verkas multon. Li kreis en 1980 la skribitan ekzamenon por kirurgaj studentoj en Kanado. Do, nuntempe la plej bona testito ĉiujare gajnas la "Norvell Prize" (Norvela Premio). Steĉjo ankaŭ faris multon en la medicina fako.


Serĉu la nomojn de viaj amikoj kaj de vi mem. Mi supozas, ke vi trovos surprizajn kaj interesajn faktetojn.

— Reni Porter

Redaktora noto: Tion ankaŭ mi faris, kaj mi trovis ke Reni (t.e. Clarence) Porter estas diversmaniere konata tra la mondo, ekzemple kiel grafika artisto, kiel vic-prezidento de usona universitato, kiel riparisto de preĝeja sonorilo, kiel edukisto de homoj kun mensaj malsanoj kaj malkapabloj, kiel veterano de militoj, kaj eĉ kiel speco de biero. Nia Reni Porter kompreneble estas konata kiel membro de la Amikeca Reto de SAT.

BLUNAZULOJ

Mi loĝis en Nova Skotio jam dum 10 aŭ 12 jaroj antaŭ ol mi komprenis kial la denaskaj nov-skotianoj priskribas la direkton al Kabo Bretono per la angla vorto „down” (malsupren) malgraŭ ke ĝi estas norde, kaj kial ili nomas la direkton al Bostono „up” (supren) malgraŭ ke ĝi estas sude de Nova Skotio. Anglalingvaj velmaristoj, kiam la vento estis dorse, nomas la direkton „downwind” (malsupren el la vento) kiam ili direktas la ŝipon for de la direkto, de kiu blovas la vento. Kiam oni lofas (t.e. oni direktas la ŝipon al la direkto, de kiu blovas la vento) ili nomas tion „upwind” (supren en la venton). La kutimaj ventoj en la maro apud Nova Skotio blovas norden, kaj la lingvo en Nova Skotio kelkfoje devenas pli el la ventoj ol el nur mapaj direktoj.



Nur lastan semajnon mi aŭdis la rakonton pri la deveno de la esprimo "Blunoser" (blu-nazulo). Tiu kromnomo estas tradicia, sed nun malofte uzata, nomo por persono el Nova Skotio. La maristoj kaj fiŝistoj en la 19-a jarcento tradicie vestis sin per lanaj duongantoj blue tinkturitaj. Tiu blua tinkturo estis loke farita kaj, kiam ĝi malsekiĝis, la koloro estis forviŝebla. Do, vintre kiam la viroj forviŝis la nazmukon, blua makulo aperis sub la nazo. Mi komprenis, post la aŭskulto de tiu rakonto, kial oni malofte aŭdas ĝin. Dank' al la plibonaj tinkturoj, hodiaŭ oni ne estas laŭvorte blunazulo.

— Reni Porter


Vintro

Ekstere,
Brilas suno
Sur neĝo blanka
kun ombroj bluaj
De arboj malhelverdaj
Per glacio arĝenta kovritaj.

Interne,
Boletas supo,
Krackadas fajro
hela en la forno,
Kaj sidas ĉe la fenestro katino
Sin puriganta.



— Laurinda Matheson



ĈION KULPIS VIROJ

Kial mi estas, kia mi estas? Kial min interesas, kio min interesas? Kial mi verkas, kiel mi verkas? Klaraj demandoj postulas klaran respondon. Ĉi tie ĝi estas:

Ĉion kulpis viroj. Ne nur Alan, kiu min sukcesis deflori... Ne nur Ŝtefo, kiu al mi donis Pragon, pli belan nomon kaj Esperanton... Ne nur Julio Baghy, nia romantika kaj reciproke inspira rilato... Ne nur Johano kaj lia amiko Sinha, kiu nin foje informis pri kvin pacprincipoj de panĉastila-neatakado, neenmiksiĝo, obstine kaj ĉiam severe paroli la veron, lasi ĉiun vivi laŭ sia propra volo, persista kunlaboro — laŭ kiu Esperanto estas kiel fenikso, ju pli oni frotiĝados pri ĝi, des pli ĝi brilos... Ne nur Ernesto, kiun mi unu tagon renkontis en la valo Ŝárka, kie pluvas dufoje...

Mi ripetas, ĉion kulpis viroj. Kiu tute neatendite degelis super Sapfa verso de komencanta poetino? Ja Pumpr! Tomáš Pumpr! Kiu iniciatis la aŭtobiografion *Hetajro dancas*? Ja Rumler! Josef Rumler! Laŭdire, „ĉio estas komunikebla”. Jozefo, Jozefo, ci fripono! Kia miro, ke Ulrich Becker poste skribis: „Uf! Nekredeble! Ĉu tio eblas en Esperanto? Ĉu la movado tion eltenos? Io tia ne ekzistas ĉe ni, kaj en kelkaj literaturoj tiaj libroj kapablas haltigi promesplenajn karierojn kaj kaŭzi politikajn krizojn.” Bone, mi pentas. Tamen, kiu tiun skandalan verkon eldonis? Ja Bays! Gersi Alfredo Bays! Hu, li riskis!

Jes, ĉion kulpis viroj. Kulpe de Ed Borsboom mi de la jaro 1997 apartenis inter „favoratojn” de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto Konferencoj)... Kulpe de Petro Chrdle ĵus aperis mia adiaŭa kolekto *Rapide pasis la temp' ...* Belaj birdetoj! Esti juna, mi sciis kiel ilin puni!

— Eli Urbanová

Preparita por IEK, Prago, Julio 2003

